


SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.




Aŭgusto-Septembro 2004 75-a jaro, n-ro 8-9 (1190-91)
MENSUEL / MONATA

**Nova
SAT-eldonaĵo !!!
La unua atesto en
la
mondo, de unu
viktimo de
"honorkrimo"**

"Vivbruligita "

estas emociega
dokumento pri la
viktimoj de la leĝo
de viroj.



**VENONTA
KONGRESO
02-07.07.2005**

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...

Karaj,

jen postkongresa surprizo. Kiel vi povas konstati, la frontpaĝo estas iom aliaspekta kaj ni havas kvar kolorajn paĝojn por la sama prezo kiel



antaŭe. Ni esperas ke nun nova Sennaciulo estas iom pli altira. Ankaŭ la papero estas ŝanĝita kaj recikligita.

En tiu ĉi numero vi trovas la unuajn impresojn pri la kongreso, Deklaracion kaj Gvidrezolucion. Krome aperas informo pri la nova eldonaĵo de SAT (kiun ni varme rekomendas al ĉiu el vi), kaj kelkaj kutimaj rubrikoj. Pli detalajn informojn pri la kongreso vi trovos en venontaj numeroj de Sennaciulo, kondiĉe ke vi pagis vian ĉijaran kotizon. Do, por ne malhavi tiujn numerojn, nepre kontrolu kaj pagu.

Kamaradece al ĉiuj, via

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesperanto@free.fr.

TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39

BIC: PSSRFRPPPAR

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro: Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

□

Imprimé par: EDRB, 7 rue Marie Pia, FR-91480 Quincy-sous-Senart.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM

Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

Limdato por ricevo de kontribuajoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

Reeldono de Nova PIV korektita kaj ĝisdatigita

La unua eldono de Nova PIV post iom da tempo elĉerpiĝos kaj ni estos devigataj reeldoni ĝin. Intertempe estas korektitaj eraroj el la unua eldono kaj la nova eldono aperos korektita kaj ĝisdatigita. Bedaŭrinde, por tiu nova eldono, nia Asocio ne disponas pri sufiĉe da mono. Pro tio ni decidis malfermi

FONDUSON

por reeldono de Nova PIV

Ni invitas SAT-anojn kaj ĉiujn esperantistojn kontribui al tiu fonduso kaj tiel ebligi la reeldonon de PIV. Pro nesufiĉa nombro de niaj membroj el kiuj eĉ granda parto pagas nur simblan kotizon, la vendo de PIV grave helpas al la financa ekvilibro de nia asocio kaj ĝia normala funkciado. Esperante vian komprenemon kaj malvaran partoprenon en tiu nia entrepreno, ni anticipe dankas al ĉiuj.

Tiuj gekamaradoj, kiuj eventuale estas pretaj prunti la monon por tiu ĉi reeldono, ni akceptas

PRUNTON

kiun ni repagos post la vendo de la reeldonita PIV. Elkoran anticipan dankon al ĉiuj partoprenantoj en tiu kampanjo.

La P.K. de SAT

AL INSTRUANTOJ DE ESPERANTO

Anonimulo aĉetis stokon de malnovaj PIV (eldono de 1987), kun duobla celo:

1 helpi al reeldono de la nova PIV

2 helpi al neriĉaj seriozaj lernantoj per senpaga disdonado de ja iom olda vortaro, tamen ne tute kaduka ilo (oni ja efike uzis ĝin dum jaroj).

Instruantoj komuniku adresojn de tiaj seriozaj malriĉaj lernantoj, al la sidejo, aŭ rete: <satesperanto@free.fr>.

(Tio kompreneble celas ankaŭ enloĝantojn de malriĉaj landoj.)

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Clarix)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx = ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

Sub la suno de Bratislava

Survoje al la kongreso akompanis min du antaŭjuĝoj: la unua - ke kongreso estos bonege organizita, la dua - ke kongresaj kunsidoj estos malfacilaj. La unua antaŭjuĝo estis pro la fakto, ke organizis la kongreson Petro Chrdle, kiu jam pruvis al SAT membroj



sian kapablon de organizanto en Straznice (1994) kaj Karlovy Vary (1999), la dua antaŭjuĝo estis pro tekstoj kiuj aperis en Sennaciulo post pasintjara kongreso en Ĉaŭdefono. La aŭtoroj de tie ne avaris pri kritikoj kaj riproĉoj. Nun, kiam Bratislava kongreso jam pasis, mi devas diri, ke mia unua antaŭjuĝo estis justa, sed la dua male...

Ni vere komforte loĝis, bonguste manĝis kaj sukcese kongresis en la hotelo Bratislava, en la rondo de 140 partoprenantoj, ĉeestis la esperantistoj eĉ de 19 landoj. Nur tiuj el ni, kiuj loĝis en la studenta hejmo, devis uzi la urban trafikon por atingi la kongresejon, sed ili havis la avantaĝon profiti siajn semajnajn trafikbiletojn kaj bone konatiĝi kun la ĉefurbo de Slovakio. Tutan semajnon ni havis tre, (eĉ iom tro) bonan veteron kaj la fakto, ke kunsida salono estis klimatizita estis tre agrabla. Alia grandega pluso, laŭ mia opinio, estis ke en la kongreshotelo ni havis senpagan retaliron, do retemuloj ne devis serĉi Internet-kafejojn kaj slovakajn kronojn povis ŝpari por bongusta slovak biero "Zlaty Bažant".

La malfermo de la kongreso estis ne tute tradicia, ĉar mankis tempo por tradiciaj gratulvortoj de la landaj reprezentantoj. La prezidanto de PK Jakvo Schram en sia salutparolado emocie kaj trafe tuŝis la problemojn de nia movado. Laŭ mia persona opinio tio estas nur pluso de solena

malfermo, ĉar ĉiujare la samajn vortojn de multaj partoprenantoj pri "sukcesa, fruktodona kaj amika" jam tedas kaj aŭskulti kaj prononci, sed mi scias ke al tiuj, kiuj tre diligente sekvas la tradiciojn tia gratulado mankas. Nu, ne mankis la komuna foto kiu atestas, ke ni estis multaj kaj diversaj kaj saluti la kongreson ĉiuj dezirantoj povis antaŭ la unua laborkunsido.

Pri kvar kongresaj kunsidoj mi volas diri, ke laŭ mi ili estis vere laborkunsidoj, ne "parolkunsidoj". Pli-malpli ĉiuj gravaj por SAT temoj estis pritraktitaj kaj ĉiuj decidoj faritaj. Multege kontribuis al tiu labora etoso la plano por kunsidoj prilaborita de Vinko Markov. Se en estonto sekvi tiun vojon kaj prikonsideri kelkajn en Bratislava akiritajn komunajn spertojn, mi kredas niaj kongresoj iĝus vere utilaj por asocio, ne nur okazo por ŝatantoj paroli publike pri ĉio kaj nenio. Kelkfoje aperis la emocioj, kelkfoje estis riproĉoj kaj grumbloj, sed kongresanoj ja estas diversaj kaj kampoj de interesoj ankaŭ estas diversaj... Ĉiu fosas sian sulkon, kelkaj laboras, kelkaj kritikias...

kelkaj kapablas kaj tion kaj alian.

Samtempe kun nia kongreso okazis en najbareco la konferenco de ILEI kaj kelkaj esperantistoj eĉ sukcesis partopreni en laboroj de ambaŭ aranĝoj. Mi bedaŭris, ke ne eblas sidi per unu postaĵo sur du seĝoj, sed ĝojis, ke almenaŭ dum manĝoj kaj ekskursoj ni renkontiĝis kun ILEI-anoj. Komence mi imagis, ke interkona vespero kaj ĉiuj vesperaj programeroj estos komunaj kaj tio estos bonega okazo por ni konatiĝi kun inteligenta instruista rondo kaj por ili de pli proksime ekkoni la "malanĝelojn", sed tiel ne okazis... Bedaŭrinde, sed mi bone komprenas la organizanton kiu konas la tiklecon de kelkaj SAT membroj kaj ilian timon ke aliaj esperantistaj asocioj estante en proksimeco povas iel influi kaj ombrigi nian kongreson aŭ eĉ asocion. Do, ŝajnas, ke pro sankta trankvilo ni estis apartigitaj, sed post amikaj vesperoj kun instruistoj ekster la programo, mi kuraĝas diri, ke ni mem kulpas, ke ne profitis la okazon. Nu, almenaŭ, en Lingva Festivalo al kiu ILEI invitis nin, multaj SAT membroj partoprenis kaj vere ĝuis la etoson kaj la prezentadojn.

Programo estis vere densa: la plej diversaj prelegoj kaj kunvenoj de frakcioj okazadis posttagmeze kaj ĉeesti ĉion ne eblis. Pri programo multe zorgis membro de PK Arturo Prent. Li klopodis ke ĉiuj frakcioj kaj tiuj kiuj jam ekzistas, kaj tiuj kiuj kreiĝas en SAT havu kondiĉojn kaj tempon por kunveni.

La ekskursoj ankaŭ estis bone elektitaj kaj laŭ celoj kaj laŭ la prezoj. Dum la duontagaj ekskursoj eblis viziti burgan ruinon Devín, historian parton de Bratislava, Gabčíkovo-Danubian kanalon aŭ atomcentralon Bohunice. Tuttagaj ekskursoj la marŝemulojn gvidis al promeno tra Malé Karpaty, aliaj vizitis simpatiajn, malnovajn urbojn de Slovakio.

Bratislava lasis la impreson de bela, historie interesa kaj rapide kreskanta ĉefurbo, moderna kaj antikva samtempe. Slovakio ja estas bela kaj tre alloga por turistoj.